

VENTO DE PACO.

La flagaro ŝvebanta vente
karesadas la sonorilon;
pasinteco je morto kaj doloro,
iu revoko por ni.

Sonu sonoril' Maria Dolens
vi invitas nin al la preĝado
nek malamo, nek milito sed
amo kaj paco en la koroj.
Estonteco por ni.

Ni ĝin sentas ĝis la koro
estu paco ĉiam tutmonde,
kaj ni kantu ĉiuj fiore
estu paco ĉiam tutmonde.

Dolĉaj estas sonoratoj
trista ŝajnas la melodio,
ĉiutage ĝi vekas en la koroj
la pardonon inter ni.

Sonu sonoril' Maria Dolens
ĉiam pluvenu la preĝado
nek milito, nek plu sango sed
amo kaj paco en la koroj
nova vivo por ni.

Ni ĝin sentas ĝis la koro
estu paco ĉiam tutmonde
kaj ni kantu ĉiuj fiore
estu paco ĉiam tutmonde.

Testo: Scuola Media B.V. Maria Rovereto 1997

Musica: Stefano Grott.

Traduzione in esperanto : Norma Cescotti Covelli e Maria Mazzoni.